Inkluziva Edukado kaj Partopreno de Minoritataj Junuloj en la Publika Vivo

Alparolo de Stefano Keller, reprezentanto de UEA,
dum la 10a sesio de la Forumo pri Minoritatoj
Palaco de Nacioj, UN, Ĝenevo,
30 novembro – 1 decembro 2017

Sinjoro Prezidanto, Sinjoro Speciala Raportisto, karaj reprezentantoj de minoritatoj naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj, karaj partoprenantoj, saluton!

Mi nomiĝas Stefano Keller, kun miaj kolegoj ĉi-ĉeestaj mi reprezentas Universalan Esperanto-Asocion (UEA), la mondan organizaĵon de la parolantoj de Esperanto, la lingvo internacia. Male ol aliaj lingvoj, Esperanto ne povas havi imperialismajn tendencojn kaj havas nenian ligon kun interesoj ekonomiaj aŭ politikaj. Ĝi estas ties lingvo, kiu ĝin elektas, kaj ĝi kreas lingvan egalecon en la komunikado inter la popoloj. Universala Esperanto-Asocio defendas la lingvajn rajtojn de ĉiuj minoritatoj kaj de ĉiuj indiĝenaj popoloj, jam ekde pli ol jarcento.

Preskaŭ ĉiuj intervenintoj menciis la mankon de eblo por la junuloj de minoritatoj, ricevi edukadon en ilia gepatra lingvo. La rajto al edukado en la gepatra lingvo estas fundamenta rajto, ĉar en nia gepatra lingvo ni komencas malkovri la mondon, komuniki kun la aliaj. En sia gepatra lingvo kapablas ĉiu el ni plej bone lerni, havi edukadon atingante bonajn rezultojn. Nia asocio forte subtenas la klopodojn strebantaj al tiu celo. Ni ŝatus ankaŭ rememorigi pri tio, ke la lernado de Esperanto estas elstara bazo por, krom la gepatra lingvo, lerni pli facile aliajn lingvojn kaj tiel subtenas la malfermiĝon al la respekto de aliaj popoloj.

Karaj partoprenantoj, membroj de minoritatoj kaj decidantoj, ni forte rekomendas al vi studi kaj uzi la Gvidilon pri la realigo de lingvaj rajtoj de lingvaj minoritatoj http://www.ohchr.org/EN/Issues/Minorities/SRMinorities/Pages/LanguageRights.aspx

Dankon pro via atento, kaj apartan dankon al la interpretistoj voĉaj kaj al iliaj kolegoj, interpretantaj en gestolingvo, por ilia laboro tre grava! Dankon!

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041